

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture sociale
sans frontières*



Tema numero : Sportoj

Paĝoj 3 ĝis 8



P. 3

**Piedpilka
Mondopokalo en
2019 kaj en Francio !
Jes ja !**

P. 4

**Triatlono :
naĝi, bicikli, kuri**

P. 5

**Handikapita
korbopilko**

P. 6

**Franca sportistaro
koleras**

P. 7

Sportumi, kiucele ?

P. 8

- **Pri Aikido**
- **Sportistinaj rajtoj**

*Legu ankaŭ
en ĉi tiu numero*

P. 10

Familiaj bestoj

P. 11

**Mia pasio pri
bonsajoj**

P. 12

**Jules Verne
esperantisto**

La vorto de la Prezidanto

Nia skipo por la unua fojo proponas *La Sagon* kun temo, kaj por tiu ĉi fojo, la proponita temo estas : la sportoj.

Tamen la temo ne okupos la tutan gazeton, ĉar kompreneble ni konservas lokon por jam kutimaj rubrikoj : Dzeka, « Libro vivas pli longe ol unu sezonon », ktp, sed precipe, ni ne nur invitas vin vigle reagi al tiuj temoj kaj en tiuj rubrikoj, sed ni memorigas, ke *La Sago* apartenas tute al ĝiaj legantoj. Alivorte, ĝi estas je via dispono, en la limoj de la disponebla loko (16 paĝoj) kaj sub la kondiĉoj de komuna saĝo, por libere esprimiĝi pri temoj, kiujn vi mem deziras pritrakti kaj eventuale debati. Ĉar la tuta Asocio apartenas kolektive al siaj membroj, tiu fakto donas la respondon al unu el la plej gravaj demandoj starigitaj dum la kongreso en Parizo : kiam vi sendas artikolon, vi mem decidu verki ĝin en franca lingvo, en Esperanto aŭ en ambaŭ lingvoj. La unulingve verkitajn artikolojn ni eventuale tradukos aŭ tradukigos notinde laŭ disponeblo de tradukontoj.

Interalie, ni atendas, ke vi prezentu spertojn pri via metio aŭ tiu de via najbaro, amiko, infano, nevo, ktp. Tia artikolo estas tiu de Stefan pri diversaj aspektoj de la vivo de kamionistoj, publikigita en *La Sago* 121 (p. 13).

Venontaj temoj antaŭviditaj estas :

- la afrikanoj, kun kiuj ni interrilatas ;
- la diversaj specoj de handikapoj, kaj iliaj ĉiutagaj konsekvencoj ;
- la migrantoj ;
- la diversaj agrikulturaj teknikoj.

Kiam vi ricevos tiun numeron, jam la nova lerneja jaro estos larĝe sur la reloĵ. Ĉe la Pariza grupo, kiu instruas en nia Sat-amikara sidejo, la kunveno cele akcepti novajn lernantojn jam okazis la 29an de septembro ; tamen novaj lernantoj certe estos bonvenaj pli poste ; ne hezitu informi pri tio ĉirkaŭ vi.

Bonvolu realiĝi sufiĉe akurate, nome antaŭ la komenco de la jaro 2019. Vidu la foliojn preparitajn de nia kasistino Solange Van Landeghem. **Petro**



La Revmedikamenta Trinkaĵo *La Potion à rêves*

Jen resumo de « la Revmedikamenta Trinkaĵo » :

Ŝamroko ĵus rompita la botleton, en kiu troviĝis la revmedikamenta trinkaĵo de Miŝelo, la magiistino de la arbaro. Rapide li devas trovi solvon por ripari sian stultaĵon ! Sed nur la friponkunikloj povas helpi lin...

Ci-dessous, le résumé de « la Potion à rêves » :

Shamrock vient de briser le flacon de potion à rêves de Michelle, la magicienne de la forêt. Vite il doit trouver une solution pour réparer ses bêtises ! Mais seuls les lapins coquins peuvent l'aider...

Bela libreto por infanoj kaj por ĉiuj revemuloj

Danke al la konsiloj dum kaj post la Kongreso, SAT-Amikaro kaj la loka Esperanto-asocio ILO decidis eldoni la libron de Hélène Cordeau. La bildoj estas belegaj, kaj allogaj por plenkreskuloj kiel por infanoj. Kun la tekstoj francaj kaj esperantaj ili donas multajn okazajn babiloj pri la rakonto mem aŭ pri la diversaj manieroj esprimiĝi en la lingvoj, kiujn

ni uzas. Utila libro por junuloj aŭ por diversaj komencantoj aŭ progresantoj en la studo de Esperanto, ĝi respondas al la celoj de niaj respektivaj asocioj, ILO kaj SAT-Amikaro. Por rapidigi ĝian aperon, vi estas invitataj antaŭmendi ĝin per la ĉi kuna mendilo.

Ansofi (prezidanto de ILO kaj komitatano de SAT-Amikaro)

Se vi deziras antaŭmendi tiun belan bildrakonton, bonvolu :

Coupon réponse – Prévente* du livre « la Potion à rêves »

M Mme Nom : _____

Prénom : _____

Adresse : _____

Mail : _____

Téléphone : _____

Je souhaite profiter du tarif préférentiel de

10 € grâce à cette offre en prévente

Nombre d'exemplaire(s) : _____

Règlement par chèque à l'ordre de l'« Association ILO », ou en espèces.
À retourner par courrier à ILO, 61, boulevard Vauban, 78180 Montigny-le-Bretonneux

(* Cette prévente, destinée à aider l'impression, est limitée au 31 octobre 2018.



La franca virina piedpilka teamo, en 2015.

Ailura

Piedpilka Mondopokalo en 2019 kaj en Francio ! Jes ja ! *La coupe du Monde de Foot 2019 en France ! Eh oui !*

Kokeriko ! Ni gajnis ! La piedpilkan mondopokalon, kompreneble !

Vi ne povis ĝin maltrafi, ne eblis ne vidi la dungitojn de niaj superbazaregoj fiere elmontrante ĉe ambaŭ vangoj nian nacian blu-blank-ruĝan flagon. Ne eblis eviti la aŭtajn hupadojn, nek ne aŭdi aŭ spekti eĉ nur pecetojn de elsendaĵoj, antaŭ ol malŝalti – incitataj aŭ ne – viajn televidilon aŭ radioaparaton.

Nu, kokeriko (1), ni ĝoju ! Eĉ se temis fakte pri ja mezbona ludo, almenaŭ laŭ la opinio de tiuj, kiuj sin taksas spertulojn. Eĉ se tio altiras monaĉon. Eĉ se aliaj sportoj pli meritis nian konsideron kaj admiron (2). Eĉ se la futbalistojn oni aĉetas kvazaŭ temus pri banalaj varoj.

Tamen tiu afero ankoraŭ ne tute finiĝis... Ĉar vi certe jam notis la datojn, vi nepre ĉeestos, ĉu ne, antaŭ via televidilo de la 7a de junio ĝis la 7a de julio 2019 (oficialaj datoj de la FIFA) ? Kio ? Ĉu vi ne scias kion mi aludas, vi opinias : « Ho la kompatindulino ! Ŝi dissemas siajn neŭronojn ! » Povas esti, sed tamen ne tiukaze... Do, tajpu sur vian komputilon : « Virina piedpilka mondopokalo » kaj vi trovos konfirmon pri tiu evento. Tiam estos la oka, kaj ĝi okazos en... Francio !

Tial, jes ja ! Bonvolu spekti tiun ĉi 2019-konkurson ! Bonvolu subteni niajn profesiajn sportistinojn ! Tiu maljustaĵo perdu iom da forto. Tiel ni iomete malpliigu la superregadon de kelkaj maskloj, kiuj kredas sin kvazaŭ la ombiliko de la mondo.

Ĉu laŭ vi mi troigas ? Nu, ek al via klavaro, kaj sendu viajn reagojn.

Lumeto

(1) Cetere, kial kokeriko ? Ĉu ĉiuj el ni ne estas pli-malpli mondĉivitanoj ?

(2) Vidu prie en tiu ĉi-numero la rakonton de David Cholet kaj tiun de Éric Le Chaix, kiu altnivele sportumas en rulseĝo.

Cocorico ! Nous avons gagné ! La coupe du Monde de foot, bien sûr !

Vous n'avez pas pu passer à côté, il n'était pas possible de ne pas voir les salariés des grandes surfaces commerciales arborant notre bleu-blanc-rouge sur chaque joue. Il n'était pas possible d'éviter les klaxons des voitures, de ne pas entendre ou voir des bouts de reportages, avant d'éteindre – excédés ou non – vos écrans ou radios.

Donc cocorico (1), réjouissons-nous ! Même si c'était du jeu bien médiocre, de moins de l'avis de ceux qui se considèrent experts. Même si c'est le règne du fric malsain. Même si d'autres sports mériteraient bien plus de respect et d'admiration (2). Même si les footballeurs se font acheter comme des marchandises.

Mais enfin ce n'est pas fini... Car bien sûr vous avez déjà bien noté les dates, vous serez forcément, n'est-ce pas, devant votre téléviseur du 7 juin au 7 juillet 2019 (dates officielles de la FIFA) ? Comment ? Vous ne savez pas de quoi je parle, vous pensez : « La malheureuse, elle est en train de perdre ses neurones ! » Ça m'arrive, mais pas dans ce cas-là... Alors écrivez sur votre écran : « Coupe du Monde de foot féminin » et vous trouverez confirmation de cet événement. C'est la 8e édition et elle se déroulera... en France.

Alors oui, s'il-vous-plaît, regardez-la, cette compétition 2019 ! Soutenez nos joueuses professionnelles ! Que cette injustice-là perde un peu de son ampleur. Ainsi nous réduirons un peu la suprématie d'une poignée de « mecs » qui se pensent le nombril du monde.

Vous trouvez que j'exagère ? Alors à vos claviers pour nous adresser vos réactions.

Lumeto

(1) Pourquoi cocorico d'ailleurs ? Ne sommes-nous pas tous peu ou prou citoyens du monde ?

(2) Voyez par exemple, dans ce même numéro, le récit de David Cholet et celui d'Éric Le Chaix qui joue en fauteuil, à un très haut niveau.

Triatlono : naĝi, bicikli, kuri

Ĝi estas sporto kun tri partoj : vi devas unue naĝi, due bicikli kaj finfine kuri.

Ekzistas diversaj distancoj : eta, malgranda, granda, grandega...

Ekzemple vi povas naĝi nur 400 metrojn, bicikli 10 kilometrojn kaj kuri 2,5 kilometrojn.

Aŭ se vi volas vi povas naĝi 3,8 kilometrojn, bicikli 180 kilometrojn, kaj finfine kuri 42 kilometrojn. Oni nomas tiun grandegan triatlono : *Ironman*, kiu signifas Ferviro.

Ofte, triatlono ne estas la unua sporto kiun oni praktikas. Multaj homoj antaŭe kuris, biciklis, eĉ ludis futbalon.

Koncerne al mi, mi multe kuris. Mi partoprenis en diversaj maratonoj, verdaj kuradoj... sed bedaŭrinde mi havis problemojn pri mia dorso, tial mi komencis naĝi kaj bicikli.

Kaj finfine mi komencis triatlono en 2008, per malgrandaj distancoj. Mi ŝatis fari la olimpikan distancon : naĝi 1,5 kilometrojn, bicikli 40 kilometrojn kaj kuri 10 kilometrojn. Mi bezonas du horojn kaj duono por fari tiun distancon.

Dum kvar jaroj mi partoprenis en diversaj triatlonoj, kaj en 2012 mi faris la duonon de « ferviro ». Mi sukcesis sed bezonas multan tempon por trejniĝi, kaj mi komencis havi in-



fanojn. Do, mi ne plu naĝis, nek triatlonis sed zorgis pri miaj tri infanoj sed ne gravas, miaj infanetoj estas pli gravaj !

Do, en 2017, kiam miaj infanoj estis pli grandaj kaj mi havis pli da tempo por trejniĝi, mi denove povis fari mian sporton kaj pripensi « Ironman ».

Mi ne laboras matene, do mi povas trejniĝi ĉiun matenon.

Mi komencis trankvile dum unu jaro. Mi lernis naĝi bonege. Mi devis

zorgi pri manĝaĵo, vundo, laciĝo, ekipaĵo, mono... mi eĉ ĉesis trinki alkoholon.

Mia vera trejnado komenciĝis je la unua de januaro 2018, kaj dum ses monatoj mi trejniĝis preskaŭ ĉiutage.

Semajne, mi naĝis 6 kilometrojn, biciklis 200 kilometrojn, kuris 30 kilometrojn. Estis laciĝe sed mi progresis. Kelkfoje mi ne ŝatis iri por bicikli aŭ kuri sub la pluvo, sed mi faris kaj poste estis kontentega.

Do, la 8an de julio 2018 mi partoprenis en « Ironman » en Frankfurto (Germanio). Tio estas grandega triatlono kun 2 600 triatlonistoj, kaj homamaso.

Mi naĝis en lago 3,8 kilometrojn. Ne estis facile naĝi dum longa tempo kun 2 599 aliaj naĝantoj, sed mi sukcesis post 1 horo kaj 25 minutoj.

Do, poste mi biciklis 185 kilometrojn dum 6 horoj 19 minutoj kaj finfine mi kuris maratonon sub varma suno dum 5 horoj 4 minutoj.

Mi estis laca sed ege kontenta sukcesi. Mi multe trejniĝis por iri ĝis la fino. Mi triatlonis dum 13 horoj kaj 6 minutoj.

Do, nun mi estas « ferviro » kaj kion mi povos fari poste ?

David Cholet

*Mia interreta sporto :
<http://course.free.fr>*

Dua parteto

Je kelkaj demandoj de Lumeto mi klarigas tiel :

Jes ekzistas kelkaj triatlonistoj kiuj gajnas monon per kluboj, markoj, kaj kiam ili gajnas kuradojn. Sed ili ne estas multaj kaj *ne* gajnas multegan monon.

En nia regiono, kluboj de Saint-Jean-de-Monts kaj Sables-d'Olonne havas triatlonistojn.

Koncerne al mi ekzemple, kiam mi partoprenis « Ironman » en Frankfurto, mi devis pagi 572 eŭrojn nur por aliĝi... estas freneze ! Tial mi kreis agon por gajni monon. Mi reakiris metalon, vendis kaj gajnis monon.

Ne estas vera solidareco en

granda manifestado kaj ni ne rajtas helpi alian triatloniston, sed en klubo ni helpas inter ni.

Jes estas « Ironwomen » kaj ili povas esti fortegaj. Ekzemple, en Frankfurto, la unua viro kuris dum 8 horoj kaj la unua virino 8 horoj 37 kaj finiĝis je la 7a vico.

Vi povas iomete vidi triatlonojn sur sporta kanalo.

Estas multaj kluboj en Francio ; mi estas en la klubo de la urbo Clisson.

Mi estas edukisto pri gejunuloj kiuj loĝas en dormejo. Mia laboro estas malfacila, mi laboras 42 horojn semajne ĝis la 22a horo kaj kvarono. Sporto estas mia eligilo.

Handikapita korbopilko

Basket handisports

Jen kelkaj linioj pri mia praktikado de konkursa sporto kiel handikapita sportisto.

Mi praktikas korbopilkon en rulseĝo de iom pli ol tri jaroj.

Mi havis la plezuron rapide aniĝi en teamo de handikapitaj korbopilkiŝtoj, kiuj ludas je nacia nivelo 1 en Saint-Herblain, tio estas la nura teamo tia en la tuta nanta komunumaro.

Ni atingis ĉi-jare la trian rangon en teamgrupo, kiu entenas dekon da teamoj kiel ekzemple Niort, Montpellier, Bordeaux kaj Bayonne.

Tiu agado, kiu postulas po kvar horojn da trejnado semajne, havigas al mi bonegan oportunun por praktiki konkursan sporton kolektivan kaj gean, kuraĝigan kaj defiplenan.

Tiamaniere, mi iel praktikas samtempe ian funkcion, dinamikan kaj plaĉan reedukadon, kaj plezure trovas tutan aron da amikoj cele al komuna projekto (kolektiva ludo, lerteco, kapableco elteni strebadon kaj doloron).

Ja kompreneble, ĉiu trejnado kaj ĉiu matĉo estas okazo venki mian antaŭtimon trovi dolorojn kaj limojn, kiuj povas esti miazake sufiĉe gravaj... kaj revigli ilin por tagoj. Sed aliflanke, mi domaĝas la moveblecon de miaj membroj, kiuj tiel pli longtempe uzeblas, kaj ja tio plej gravas.

Jen resume la praktikado de sporto en rulseĝo : la reguloj kaj postulaĵoj estas samaj, kiel por nehandikapitaj sportistoj... escepte kompreneble la « paŝadon », kiun anstataŭas du puŝpremoj sur la manrelon de la fotelo ! Ankaŭ aldoniĝas la ebleco porti la pilkon sur la genuoj... sed ne antaŭenirante ! Krome sciindas, ke nehandikapuloj rajtas kunludi (kaj tiel estas en preskaŭ ĉiuj teamoj), konsentinte uzi mem rulseĝon, kaj tio estas belega vivleciono, tute certe !

Éric Le Chaix

Voici quelques lignes au sujet de ma pratique sportive de compétition en qualité d'« handisportif ».

Je pratique le basketball en fauteuil roulant depuis un peu plus de trois ans.

J'ai eu le plaisir d'intégrer rapidement une équipe d'handi-basketteurs évoluant en niveau national 1 à Saint-Herblain, unique équipe de l'agglomération nantaise.

Cette année nous nous sommes classés troisièmes d'une poule d'une dizaine d'équipes allant de Niort jusqu'à Montpellier, Bordeaux ou Bayonne.

Cette activité qui demande quatre heures d'entraînement par semaine me procure à la fois une très belle opportunité de pratiquer un sport collectif de compétition mixte, stimulant, porteur de défis et de dépassement de soi.

Ainsi je pratique à la fois une forme de rééducation fonctionnelle dynamique et plaisante, et j'ai la motivation de retrouver une équipe de copains autour d'un projet commun de performances (jeu collectif, adresse, endurance, résistance à l'effort et à la douleur).

Bien sûr, chaque entraînement et chaque match est l'occasion de surmonter l'appréhension de retrouver mes douleurs et mes limites, parfois importantes... et de les réveiller pour plusieurs jours, mais en même temps, je préserve la mobilité de mes membres qui resteront ainsi valides plus longtemps et ça c'est essentiel.

Voilà résumée cette pratique du sport en fauteuil roulant, ses règles et ses exigences sont les mêmes que pour les sportifs valides... à part le « marcher » naturellement, remplacé par deux poussées sur les mains courantes du fauteuil ! S'ajoute aussi la possibilité de porter la balle sur les genoux... sans marcher ! À noter que des personnes valides peuvent (et c'est le cas dans presque toutes les équipes) nous rejoindre en acceptant de jouer en fauteuil roulant, c'est une belle école de la vie je vous assure !

Éric Le Chaix



Zoé Cormerais



Zoé Cormerais

Franca sportistaro koleras

La franca sportistaro koleras, ĝi ne plu povas toleri mistraktadon. Raportantino de la franca buĝeto pri sporto kaj asocia vivo, la deputitino de Seine-Saint-Denis Marie-George Buffet ekbatalas kontraŭ la dismembrigo de la ministerio pri sportoj, komenca de la registaro. Intervjuo.

En tiu ĉi semajno, oni solenos la unuan jaron de la atribuo de la ludoj de 2024 en Parizo. Tamen la sporton neniam tiel mistraktis la ŝtato...

Marie-George Buffet. Jes, okazas fronta atako per tiu klabobato konsistigita de la atako kontraŭ la teknikaj konsilantoj de la ministerio. Ĉefe, kiam oni scias, ke tiuj konsilantoj faras la kvaliton de la sporta kadro de la sporta movado kaj fondas grandan parton de la ŝtata engaĝiĝo ĉe la sportaj federacioj. Sed tio ne estas la tuto : kiel raportantino de la buĝeto de 2019 pri sporto kaj asocia vivo, mi enketas ĝuste nun ĉe la diversaj sportaj agantoj, kaj oni ankaŭ povus rigardi, kio okazas ĉe la nivelo de la medicino por atletoj. Oni faras al ni multajn paroladojn pri sanna sporto, sed la kuracistoj de la federacioj ja malfacile plenumas sian mision ĉar mankas rimedoj konsentitaj al la federacioj en iliaj celadaj konvencioj kun la ministerio. Jam de jaroj, la sporto estas en situacio de mistraktateco.

La vojo ŝajnas pli kaj pli facila al malmuntado de la ministerio de la sportoj, kiun « glutus » la estonta Agentejo de la franca sporto, ekestonta proksime de 2019 ?

M.-G.B. Mi apriorie ne juĝas tiun agentejon. Sed necesas, ke la ministerio de la sportoj plene restu ministerio kun la rimedoj por disvolvi veran sportan politikon. Oni bezonas la publikan potencon sur la tereno de la sporto.

Por tio, ĉu la konstante celenda direkto, kiun vi defendas, estas 1 % de la ŝtata buĝeto rezervata al la sporto ?

M.-G.B. Jes, sed oni malproksimiĝas de ĝi jaro post jaro, kun pli kaj pli reduktita buĝeto de la sportoj. Ankorau en ĉi tiu jaro, la buĝeto de la ministerio denove estas reduktita. Ĝi ne superos 450 milionojn da eŭroj.



Nico9393

Tio estas mizera, apenaŭ 0,13 % de la ŝtata buĝeto. Kaj krom tio, oni nun detruas la nacian Centron por la disvolvo de la sporto (CNDS), kies rimedoj estas pli kaj pli reduktataj dum ĝia ĉefa celajo estis la helpo al la kluboj kaj la kreo de proksime atingeblaj ekipaĵoj. Tiom pli ŝoke estas konstati tion, en momento, kiam vi havas ministerion, kiu difinas la celajon de 80 medaloj por la franca sporto en la Olimpaj kaj Paraolimpaj ludoj de Parizo en 2024. Kaj plie, dum ni ankaŭ pretiĝas akcepti grandajn eventojn, kiel la tutmondan Pokalkonkurson de virina futbalo en 2023, oni diras al la sporto por ĉiuj kaj al la federacioj, kiuj preparas la estontan altan nivelon : « Jen do, vi devos redukti vian buĝeton ! » Tio estas absoluta kontraŭsenco, surkapa paŝado !

En tiu kunteksto, ĉu la nova ministrino pri sportoj, Roxana Maracineanu, ankoraŭ havas agmarĝenon ?

M.-G.B. Ŝi jam kuraĝis kvalifiki « tre brutala » la unuan anoncon pri la sorto de la 1 600 CTS (teknikaj sportaj konsilantoj) [pri kies postenoj likvido estis decidita]. Sed ŝi devas nun porti sian propran politikan paroladon por aserti, ke ŝi bezonas rimedojn por sukcese fronti la defiojn metotajn al la franca sportistaro en la venontaj jaroj. Ni atendu vidi, kiel ŝi alprenos pozicion en la momento de la buĝeta debato, fronte al la proponoj, kiujn la parlamentanoj povos fari. Nun, mi evidente deziras, ke ŝi havu pli bonan buĝeton, sed ĉefe, ke ŝi batalu por tio.

Kiel deputitino de Seine-Saint-Denis, vi estas en kontakto kun multaj sportaj asocioj. Kion ili diras al vi pri la situacio ?

M.-G.B. Dum tiu semajnfino, mi ĉestis tri festojn de la asocioj en tri urboj de Seine-Saint-Denis (La Courneuve, Dugny kaj Stains), kaj mi povas certigi vin, ke la klubgvidantoj koleregas. Ili ne plu povas elteni sian mistraktadon kaj ili atendas, ke oni malfermu al ili pordojn, ĝuste por manifesti sian malkontenton. Apud tio, la parlamentanoj havas propran ludotan rolon : mi invitas do la deputitojn, kiuj sur la tereno konas la malfacilaĵojn de la sportaj asocioj, ke ili agu en la momento de la voĉdono pri la buĝeto, farante proponojn por malplafoni la taksojn destinitajn al la amatora sporto, kreskigi tiun aŭ alian buĝetan linion. La Parlamento devas plenumi sian funkcion pri la venonta buĝeto de la sportoj.

Ĉu vi sentas la sportan movadon preta ekmobiliziĝi ?

M.-G.B. Se reala moviĝo ne okazos, la sporta movado ekmobiliziĝos, kaj mi tion forte esperas, ĉar ĝi ne estas la Granda Silentulo ! Ekzistas geviroj, kiuj dediĉas grandan parton de sia vivo al la disvolviĝo de la sporto kaj ili rajtas preni la parolon por protesti kontraŭ la situacio farata al ili. Ili do atendas de la tutlanda sporta movado, ke ĝi organizu la mobiliziĝon, ĉar malfacile estas agi izole, ĉiu en sia angulo.

Ĉu urĝe estas ekfunkciigi la nacian petskribon por kreskigi la rimedojn de la franca sporto, kiun la olimpa Komitato devis lanĉi lastan semajnon, antaŭ ol suspendi ĝin ?

M.-G.B. Jes, necesas tre rapide lanĉi tiun tutlandan petskribon preparitan de la franca olimpa kaj sporta nacia Komitato (CNOSF). Oni povas tre rapide kolekti centojn da miloj da subskriboj, ĉar multaj estas la volontuloj kaj licenculoj en la kluboj. Okazas vera sento de trodediĝo, necesas ĝin esprimi.

Intervjuo realigita de Frédéric Sugnot, l'Humanité, 11an de septembro 2018, pp. 19-20.

Tradukis Petro Levi

Sportumi, kiucele ?

Eblas fakte sin demandi, kial diable oni emas sportumadi...

Ĉu, post longega migrado tra senaŭtovoja savano, priserĉinte fruktojn aŭ radikojn por sin nutri (aŭ postkurinte mamuton samkiel nia probable misa imago emas ilin bildigi) niaj praaj geavoj sentis iam la bezonon levi gison aŭ alŝoti akvomelonon ? Eĉ pli proksime, ĉu laboristo, post longa laborotago funde de minejo aŭ de uzino povis nereteneble deziri ĝispsirmankan kuradon ? Tamen, sportoj ŝajne aĝas kiel la homaro mem. Jam en la antaŭkolumbaj tempoj aztekoj ludis pere de pilko el latekso. Krome, ĉu eblas forgesi la antikvan helenan originon de niaj modernaj Olimpikoj ?

Do, se vere homoj de ĉiam sportumis, ĉu tia agado estas tipe homa ? Alidirite, ĉu ankaŭ bestoj kelkiam sportludas ?

Nu... se vi konus mian hundon ! Kvankam jam maljuna, li certe ne perdas okazon petoli tuj kiam eblas... Sed hundo, vi diru, estas dombesto, forte misinfluita de jarmila kunhoma vivado. Jes, sed se sporto havas sian devenfonton en ludoj, ankaŭ sovaĝaj bestoj ja ludas, ĉu pro eduka celo aŭ ne. Spektante saltadojn de kapreoloj, disflugadon de paseroj sur tegmentojn, flirtadon de papilioj super kampofloroj, ne eblas dubi, eĉ se parto de iliaj vivceloj plu nekompreneblas, ke la vivenergio en ili espri-



NiallS

miĝas tra korpa plezurplena moviĝemo, same kiel ĝi esprimiĝas en kantadoj kaj blekadoj, buntaj koloroj kaj... seksallogaj paradoj.

Nu... jes, sporto havas ankaŭ tiun proprecon : konkurenco. Memorante pri la kelta pradeveno de futbalo kaj rugbeo, tio estas vireca batalo inter du vilaĝaj klanoj por akiri ian felon pilkforme kudritan, eblas kompreni ke vivenergio ne estas tiukaze nura sencela ĝojspruco, sed havas aliajn motivojn. La masklaro trejniĝu kaj unuigi, preparante sin al eventualaj pli seriozaj bataloj, montru siajn muskolojn kaj lertecon por timigi la malamikojn. Sed ne nur malamikojn... Ankaŭ la inaro spektas la paradon. Venas tiam miamenssen bildoj de masajaj junuloj transsaltantaj bovojn aŭ dancantaj dum horoj kun la celo esti rimarkita de junulino. Nenio ekono-

mia en tio kaŝiĝas. Nur vivenergio, seksenergio, super tradicie militista fundo.

En niaj nuntempaj modernaj socioj, la vorto « sporto » tuj enkapigas ideojn tute aliajn, Temas pri istaj sportistoj, ŝovinismaj teamoj, tutmondaj spektaklegoj, sponsoroj, monaĉo kaj... dopado. Aliflanke, jes, ni plejparte bezonas movi nian korpon por bruligi kaloriojn pro la troa sidemo de nia antaŭekrana vivmaniero. Sed kiom el tiuj laŭdire « sportemuloj » preferas sporton precipe sidante en divano, kun biero enmane, antaŭ matĉo televide elsendita ?

Koncerne min, la vorto « sporto » kutime efikas por estigi urtikarion kaj eĉ kelkfoje vomemon. Ĉar la sporta realeco montriĝas sufiĉe konsterna. Kaj eĉ ĉe multaj amatoroj, tiu interna ideo de konkurado kaj venko naŭzas min. Sufiĉas memori la PIVan difinon de « konkuri » : « peni superi alian » !

Tamen, se sporto povus vere respondi, kiel koncerne bestojn, al tiu bezono moviĝi kaj esprimi sian vivenergion, se ĝi povus igi nin plezure kunludi, senpretende kunkuri, ĝoje partoprenigi, kunvivante agrablajn kaj sanigajn spertojn, tiakaze, jes, sporton mi ja ŝategus.

Luc Gouverneur



madaise

Pri Aikido

De multaj jaroj, mi regule aikidumas. Unue, mi deziris renkonti homojn en aliaj lokoj ol la laborejo. Tiam mi loĝis en malgranda vilaĝo kaj la elektoj estis malmultaj. Dank' al afiŝo sur montrofenestro, mia scivolemo kondukis min al aikido.

Serĉi la bonan movon, la bonan lokon por kapabli la deziratan teknikon estas ĉiam preciza ekzercado. Kontesti sin kaj sian trejnadon estas regulo de gesportuloj por kapabli la perfektan geston.

Aikido devenas de Japanio, kaj signifas « ai » : harmonion, « ki » : energion, « do » : vojon. Mi tradukas tion

tiele : uzi mian energion por serĉi la vojon al harmonia vivo kun la aliaj. Tio estas mia difino, eble ne de ĉiuj praktikantoj.

Mi devas konfesi ke estas kelkfoje malesperige ĉar ofte mi kredas sciopovi la movon, ĉar mi kapablis ĝin multajn fojojn kun kelkaj praktikantoj, dum kun aliaj mi ne sukcesas. Kaj mi devas konsenti ke mi devos denove kontesti min kaj daŭrigi la trejnadon por plibonigi mian aikidon.

La avantaĝo de aikido estas ke ni devos forgesi nian muskolan forton por kapabli la teknikon, kaj tio estas eble la plej malfacila, kion nia homa cerbo povas kompreni kaj vivi.

Solange Van Landeghem



RR (DR)

Sportistinaj rajtoj

La 6an de julio 2018 en Bruselo, la « World Players » (tutmonda asocio de profesiaj sportistoj) kaj ties eŭropa branĉo « Uni Eŭropa Sports » okazigis gravan renkontiĝon por firmigi eŭropan aliancon inter korbopilistoj, kaj ebligi forigon de la malhelpoj, kiujn frontas multaj ludantinoj, tiel malfermante la vojon al venontaj atletinoj.

Kadre de projekto financita de la Eŭropa Komisiono, ili venigis ok altnivelajn korbopilistinojn je diversaj etapoj de ilia kariero, kaj kune kun aliaj partoprenantoj pere de videokonferenco, tiuj virinoj detale klarigis siajn zorgojn koncerne korbopilikon, kaj la sportan industrion pli ĝenerale.

Tiuj inaj atletoj, same kiel multaj viraj, ne estas agnoskitaj kiel profesiuloj, kio okazigas multajn problemojn pri dungado, kontrakto, manko de emerita kaj feria rajtosistemoj.

La atletinoj krome detale klarigis la diskriminaciojn, kiujn ili suferas kiel virinoj en la sporta industrio. Multaj el ili devis ĉesigi sian karieron por naski infanojn pro manko de leĝaro ĉi-rilate. Ili tiam devis maljuste elekti inter kariero kaj familio. Ili ludas ne nur por plezuro, sed havas ja laborpostenon. Tial ili volas rajtojn kaj respekton.

« Uni Eŭropa Sports » proponas solvan elirvojon pere de socialaj konvencioj por doni al sportistinoj la profesian kaj socian sekurecon, kiujn ili postulas kaj ja meritas.

Dank' al plifirmigo de tiu korbopilka eŭropa alianco, bazo devus esti starigita, por ke la venontaj generacioj havu karierojn sekurajn, justajn kaj kontentigodajn. Sportistinoj, kiuj estas ankaŭ laboristinoj, ne plu elektu inter vivo familia kaj profesia.

Tiu projekto, subtenata de la asocioj « Uni Eŭropa Sport » kaj « World Players » daŭros dum 18 monatoj.

Jocelyne Monneret

eltirita el la numero 599 de la revuo « La fédération ».


Krucenigmo Arkpafilo

Horizontale

- a** - Sagoj ĉiuj sinsekve pafitaj de ĉiu arkisto.
- b** - Premio post sukceso.
- c** - Ŝnureto ambaŭflanke alkroĉita.
- ĉ** - Uzita por ekvilibri la arkon.
- d** - Tiele nomiĝas la ludanto.
- e** - Atentu ! Danĝera zono inter la pafistoj kaj la celoj.
- f** - Fleksebla parto de la arko.
- g** - Nomo de tre interesa revuo !

Vertikale

- 1** - Sukcese trafita de la plej spertaj arkistoj.
- 2** - Cirklo atingenda de la ludantoj.
- 3** - Oni devas teni ĝin per premita mano.
- 4** - Konkurso inter kluboj.
- 5** - Ludi je tiu sporto.
- 6** - Uzita por scii la ĝustan trajektorion.
- 7** - Mallarĝa sako entenantanta la pafaĵojn.
- 8** - Necesa ilo por ĉiu ludanto !



La solvo lokiĝas en la paĝo 10.



RR (DR)

Premio Poezio en Libereco

Prix Poésie en liberté

Ĉiujare estas organizita « Premio Poezio en Libereco » sub aŭspicio de la franca ministerio de Edukado kaj kun subteno de akademio de Kreteĵ' (pariza suburbo). Temas pri internacia franclingva konkurso direktita al junuloj inter 15 kaj 25 jaraĝaj, kaj kiu disvolviĝas en la reto pri libera temo. Ĉiujare ĉirkaŭ 4 000 junuloj el 65 landoj partoprenis.

Estas notinde ke, unuan fojon en 2018, poemoj en Esperanto ankaŭ estis akceptitaj, 48 junuloj tion profitis el 20 landoj.

La 25an de majo, la du ĵurioj kunvenis por interkonsiliĝi en sidejo de franca ministerio de Edukado. Por la poemoj en Esperanto, la tri laŭreatoj estas Ingrid Berglund de Sundsvall (Svedio), Elisa Estévez de Tabio (Kolumbio) kaj Eva Pechová de Prago (Ĉekio).

La rezultoj estis oficiale publikitaj la 2an de julio en universitato de la Sorbono kaj la 22an de novembro estos granda ceremonio en Parizo, en kiu estos invitataj la gajnintoj.

La poezio en Esperanto ĉiam havis imponan situacion en tiu lingvo. Ludwik Leizer Zamenhof estis unua esperantista poeto, ĉar li ekzerciĝis jam de sia unua libro « Internacia Lingvo » (1887), kun la du poemoj « Mia penso » kaj « Ho mia kor' ». Komence sub formo de traduko de aŭtoroj, la poezio en esperanto sciis iom post iom riĉiĝi per originalaj verkoj. Nuntempe, ĝi estas flanko de esperanta literaturo ĉiam aktuala, rekompensita ekzemple okaze de beletraĵ konkursoj (Vikipedio).



Chaque année est organisé le Prix Poésie en liberté sous l'autorité du ministère français de l'Éducation et avec le soutien de l'académie de Créteil (en banlieue parisienne). Il s'agit d'un concours international en langue française qui s'adresse aux jeunes de 15 à 25 ans de tous les pays, et qui se déroule sur Internet autour d'un sujet libre. Cette année quelque 4 000 jeunes de 65 pays y ont participé.

Il est à signaler que, pour la première fois en 2018, des poèmes en espéranto étaient également acceptés, ce dont ont profité 48 jeunes de 20 pays.

Le 25 mai les deux jurys se sont réunis pour délibérer au siège du ministère français de l'Éducation. Pour les poèmes en espéranto, les trois lauréats sont respectivement Ingrid Berglund de Sundsvall (Suède), Elisa Estévez de Tabio (Colombie) et Eva Pechová de Prague (Tchéquie).

Les résultats ont été officiellement annoncés le 2 juillet à la Sorbonne, et le 22 novembre aura lieu une grande cérémonie à Paris, à laquelle seront invités les vainqueurs.

La poésie en espéranto a toujours eu une présence importante dans cette langue. Ludwik Leizer Zamenhof fut le premier poète espérantiste, puisqu'il s'y exerça dès le premier livre « Langue internationale » (1887), avec les deux poèmes « Mia penso » et « Ho mia kor' ». Au départ présente sous la forme de traductions d'auteurs, la poésie en espéranto a su au fil du temps s'enrichir d'œuvres originales. De nos jours, il s'agit d'un pan de la littérature espérantophone toujours présent, récompensé notamment lors des « concours de belles lettres » (Wikipédia).



CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763-1319. SAT-Amikaro, 132/134, boulevard Vincent-Auriol, 75013 Paris.

Directeur de la publication :

Pierre Lévy.

Imprimé par :

Parbleu!/Ravin Bleu 75017 Paris.

Dépôt légal à parution.

Ĉefredaktanto : Petro Levi.

Enpaĝiganto : Jean-Luc Ancey.

Redakt- kaj kontrol-skipo : Janine kaj Yannick Dumoulin, Luk' Gouverneur, Ĵak Le Puil, Petro Levi.

Partoprenis en ĉi numero :

Janine Dumoulin, Lucette Échappé, Josiane Ferrand et son petit-fils, Luk' Gouverneur, Pierre Grollemund, Izabel' LamiRested', Éric Le Chaix, Agnès Lefèvre, Ĵak Le Puil, Petro Levi, Vito Markovo, Jocelyne Monneret, Tereza Sabatier.

Kontribuajoj

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto : sekretario@sat-amikaro.org kaj pa-

rallele al lucette.lumeto@laposte.net

Samajn retadresojn por ajnaj rimarkoj/kritikoj (sed ĝentilaj) *Mêmes adresses courriel pour toutes remarques*

- Prefere per reto, tekstoj en RTF-, ODT- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF-, JPEG-, PCX- aŭ GIF-formo.

- Eventuale sur papero, tekstoj prefere tajpitaj.

- Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

Contributions

Toujours bienvenues ! À faire parvenir au correspondant de la rédaction.

- *De préférence par Internet, textes en format RTF, ODT ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*

- *éventuellement sur papier par poste, les textes de préférence typo-*

graphiés pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge).

- *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Reproso de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.

Tarifoj Tarifs	Be, CH Fr	Aliaj landoj
Kotizo (kun abono 60 %) <i>Cotisation (avec abonnement)</i>	35,00 €	42,00 €
Kotizo sen abono <i>Cotisation sans abonnement</i>	14,00 €	14,00 €
Subtenkotizo (abono 30 %) <i>Cotis. soutien (abon. 30 %)</i>	70,00 €	84,00 €
Junulo (malpli ol 25 j.), senlaborulo, kunul(in)o Jeune (moins de 25 ans), chômeur, conjoint(e)	17,50 €	21,00 €
Minimuma kotizo <i>Cotisation minimale</i>	libera	libera
Simpla abono <i>Abonnement simple</i>	32,00 €	39,00 €

Mia pasio pri bonsajoj - *Ma passion pour les bonsaïs*

Antaŭ dudek jaroj, mi estis fervorega pri bonsajoj. Ilia kultivado estas arto devena el Ĉinio.

Dum la sesa jarcento, la Ĉinoj kolektis arbojn, kiuj kreskis en la fendetoj de la montoj. Tiuj nature naniĝis ĉar la malfavoraj medioj kaj la severa vetero kontribuis malhelpi normalan kreskadon.

Nun bonsajo estas arbeto en poto, kiu, se oni metas ĝin en naturan medion kreskos ĝis iĝi granda arbo kiel tiuj samspecioj.

Dum pluraj printempoj mi semis multe da grajnoj de arboj el niaj regionoj. Mi havis proksimume tricent junarbojn en potetoj. Nature fariĝis la selekto : la malpli fortaj mortis, mi donis aŭ interŝanĝis aliajn, kaj laste mi konservis ĉirkaŭ kvardek specimenojn kiujn mi prizorgis ĉiutage kun amo. La plej aĝa estas acero dudek tri jarojn aĝa.

Mi havas la jenajn speciojn : ginko, acero, frakseno, bukso, ulmo, pino, abio, cipreso, kratago, azaleo, ktp.

Ĉiuprintempe, mi devas ŝanĝi la teron de ĉiuj potoj, kaj mallongigi la radikojn, poste pritondeti la foliaron por konservi la plej belan aspekton al ĝi. Ĉiuvintre mi ŝirmas ilin de frosto, ĉar se la radikoj frostiĝus, la arbetoj mortus.

Agnès Lefèvre (apud Nanto)

Il y a une vingtaine d'années j'ai été enthousiasmée par les bonsaïs. Leur culture est un art qui nous vient de Chine.

Au sixième siècle les Chinois récoltaient des petits arbres qui croissaient dans les anfractuosités des montagnes. Ils étaient naturellement nanifiés, car la sévérité du milieu et la rudesse du climat contribuaient à empêcher leur croissance normale.

De nos jours le bonsaï est un arbuste en pot qui, si on le mettait dans son milieu naturel, grandirait jusqu'à devenir un grand arbre comme ceux de son espèce.

Durant plusieurs printemps, j'ai semé beaucoup de graines d'arbres de nos régions. J'ai obtenu, approximativement, trois cents plants de jeunes arbres en pots. La sélection s'est faite naturellement : les plus faibles sont morts, j'en ai donné et échangé d'autres et finalement j'ai gardé une quarantaine de spécimens dont j'ai pris soin chaque jour avec amour. Le plus âgé est un érable de vingt-trois ans.


Je possède les espèces suivantes : ginkgo, érable, frêne, buis, orme, pin, sapin, cyprès, aubépine, azalée, etc.

Chaque printemps, je dois changer la terre de tous les pots, et raccourcir les racines, puis opérer une défoliation d'entretien pour conserver le plus bel aspect. Chaque hiver, je les protège du gel, car si les racines gelaient, les arbustes mourraient.

Agnès Lefèvre



Azaleo.



Cedro.



Ginko.

La plej perfekta estaĵo de la tuta kreitaĵo

Se muŝo mi estus, mi tutcerte kredus min la plej perfekta estaĵo de la tuta kreitaĵo.

Ĉar nu... kia flugilhavulo povus min iel konkurenci en la arto flugi ?

Karoserio ne nur aerodinamika, sed krome kvazaŭ frapimuna, al mi ebligas kolizii sendifekte kun iu ajn el viaj domvitroj. Fu ! Eĉ ne doloras !

Dank' al miaj milfacetaj okulparoj, la tuta mondo kuŝas unurigarde ĉirkaŭ miaj ses kruretoj.

Kaj kio direblas pri mia flarilo ? Ĉu ĝi ne efike sciigas, kie troveblas la plej delectinda mortinta rataĉo de la tuta ĉirkaŭaĵo ?

Aĥ ! Kiel belas la vivo muŝa ! Nenifarendas krom postkuri muŝinojn aŭ eĉ... muŝojn bugri.

Kaj kiam la bezono eksentiĝas, ni frandeme alflugas vian freŝdemetititan merdon.

El la tuta vivularo, ni muŝoj certe estas la lastfina kulmino, la piramidopinto de l' vivevluo.

Luko



Karoserio aerodinamika kaj krome kvazaŭ frapimuna.

Libro vivas pli longe ol unu sezonon...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara-kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Jules Verne esperantiste!

Une langue universelle pour une œuvre atemporelle...

(Jules Verne esperantisto!

Universala lingvo por ekstertempa verko...)

de Lionel Dupuy, esperantigis Arme-la LeQuint kaj Ĵak Le Puil, SAT-Amikaro, aprilo 2009, dulingva eldono, 96 paĝoj, 8 €. Antaŭparolo de Bernard Duperrein, docento pri sociologio, Universitato de Paŭo kaj Adour-regiono.

En la unua duono de la libro, ni ekscias pri la verkisto kaj geografo: la *Eksterordinaraj Vojaĝoj*, pri lia arto komuniki eksterordinairecon, pri *Dudek mejloj sub la maro*, pri apenaŭ konata romano *Frritt Flacc* kaj pri la admiro de Jules Verne por Elisée Reclus, la geografo-anarkiisto.

La dua parto detale prezentas la nefinitan romanon de Verne *Esplorvojaĝo*, kie Esperanto ĉefrolas (Istvan Ertl esperantigis ĝin por spe-

ciala literatura numero de *Franca Esperantisto*, en 1994). Oni i.a. ekscias, ke la filo, Michel Verne, uzos nur tre malmulte da elementoj el *Esplorvojaĝo* por redakti sian propran rakonton: *La miriga aventuro de la Barsac-misio* (1914). Ve, ne ĉiam « kia la patro, tia la filo »! Kaj samtempe jen libro por lerni la francan!

Ĵak Le Puil

Jules Verne, verkisto kaj geografo la Eksterordinaraj Vojaĝoj

Geografio, vojaĝoj, ekspedicioj aparte ĉarmas la romaniston, kiu deklaras je la fino de sia vivo: « *Vi rimarkos ke geografio estas samtempe mia pasio kaj mia studobjekto. [...]*

*Mi havis kiel celon priskribi la Teron, kaj ne nur la Teron, sed la universon, ĉar mi foje transportis miajn legantojn for de la Tero en miaj romanoj. Kaj mi samtempe provis atingi idealan stilon (1). » Kelkajn jarojn antaŭe, Hetzel mem precizigas la ĝeneralan celon de *Eksterordinaraj Vojaĝoj*, en korpuso de 62 romanoj el la 80 verkitaĵoj far la aŭtoro dum ties vivo: « *Rakontisto plena de imago kaj fajro, originala kaj pura verkisto, vigla kaj rapida spirito, egala al la plej lertaj pri la arto ligi kaj malligi la neatenditajn dramojn, kiuj donas tiel fortan intereson al liaj aŭdacaj konceptadoj, kaj flanke de ĉio ĉi, funde instruita, li kreis novan ĝenron. Kion oni tiom ofte promesas,**




Nadar

kion oni donas tiom malofte, instruado kiu amuzas, amuzo kiu instruas, tion S-ro Verne malavare prodigas, en ĉiu paĝo de siaj kortuŝaj rakontoj. [...] Nepras diri, ke la arto por la arto ne plu sufiĉas en nia epoko, kaj ke venis horo kiam scienco havas sian lokon en literaturo. S-ro Jules Verne unue kaj majstre decifris tiun novan grundon, jen lia merito. [...] La novaj verkoj de S-ro Verne sinsekve aldoniĝos al tiu ĉi eldono, kiun ni ĉiam zorgige flegos. La aperintaj kaj aperontaj verkoj tiel entenos entute la planon, kiun antaŭvidis la aŭtoro, kiam li subtitolis sian verkaron Vojaĝoj en la konataj kaj nekonataj mondoj. Lia celo fakte estas resumi ĉiujn geografiajn, geologiajn, fizikajn, astronomiajn konojn, arigitajn de la moderna scienco kaj refari sub alloga kaj pitoreska formo, propra al li, la historion de la universo (2). »

Do, geografio estas la esenca parto de *Eksterordinaraj Vojaĝoj*. Sed tia geografio ekzistas nur tra la homoj, kiuj ĝin aplikas, ĝin skribas. Kiujn vortojn uzi do, por esprimi tian geografion, kiun lingvon, kiun formon por diri tiel kompleksajn raportojn kunigantajn la homon al la tero?

(1) Robert Sherard. Jules Verne, liaj vivo kaj laboro, rakontitaj de li mem, 1894. En: *Compère Daniel*; Margot Jean-Michel. Entretiens avec Jules Verne (Kunparolado kun J.V.) 1873-1905. Paĝo 92.

(2) *Averto de la eldonisto en Vojaĝoj* kaj aventuroj de Kapitano Hatteras, 1866.



Domaine public

Rimarku la stelon sur la revuo sub la mano de la verkisto: estas esperantista gazeto!

Penigaj laboroj - *Travaux pénibles*

Ĝenerale homoj, kies salajro estas alta, malofte atentas pri tiu de laboristoj, kies laboro estas peniga kaj salajro malalta.

Iam, mi trovis iun apologon, kiun mi taksis interesa pri tiu afero. Mi decidis ilustrati sindikatan informtabelon metante bildetojn anstataŭ certaj vortoj.

Kun granda miro, mi konstatis, ke malmultaj kiuj legis vere komprenis la ideon. Mi devis klarigi, ĉar ne estis la kutimo pagi pli pro penigaj kaj malpuraj laboroj ; tamen mi memoras ke antaŭ jaroj, oni diris ke en Rusio, la penigaj laboroj estis pli pagitaj ol ekzemple instruado.

Jen ĝi : Iam,



plena de eminentaj kleruloj sinkis en maro, sed feliĉe apud

En général, les gens qui ont un bon salaire font rarement attention à celui des travailleurs dont le travail est pénible et le salaire peu élevé.

Un jour, j'ai trouvé un apologue qui m'a paru intéressant à ce sujet. Je décidai d'en illustrer le tableau d'informations syndicales, remplaçant certains mots par des images.

À ma surprise, peu de ceux qui le lirent comprirent l'idée, et je dus leur expliquer, car ce n'était pas habituel de payer davantage les travaux pénibles et sales ; pourtant je me rappelle que dans les années passées, on disait qu'en Russie les travaux pénibles étaient mieux rémunérés que par exemple l'enseignement.

Voici donc : Un jour, un



chargé de savants éminents fit naufrage en mer, heureusement près d'une



Ĉar ĉiuj el ili estis demokratoj, ili decidis organiziĝi kaj kreis respublikon.

Ĉiuj metioj necesis por ebligi vivon de la enloĝantoj. De kloakisto ĝis Prezidento. Ili dispartigis la rolojn inter tiuj eminentuloj, kaj, laŭ antaŭaj spertoj, decidis pri la salajroj.

Poste, iu, kies rolo estis kloakisto, intervenis, kaj levante la manon petis parolon :

« Karaj geamikoj, mi petas pardonon, sed same kiel miaj eminentaj kolegoj, mi kapablas esti Prezidento, kaj tiel ricevi pli komfortan salajron por pli taŭga laboro kun miaj kapabloj. Do, mi ŝatus ke oni tion konsideru kaj pagu al mi pli altan salajron por kompensi tiun malagrablan kaj penigan laboron, eĉ ebligi ke mi laboru dum malpli da horoj por ŝpari vivforton ĝis mia emeritiĝo ! »

Tereza

Comme ils étaient tous démocrates, ils décidèrent de s'organiser et créèrent une république.

Il fallait tous les métiers pour permettre la vie des habitants. Du vidangeur au Président. Ils distribuèrent les rôles entre tous ces éminents personnages et, selon leurs expériences passées, décidèrent des salaires.

Puis, l'un d'eux, qui devait jouer le rôle de vidangeur, intervint, levant la main, il demanda la parole :

« Mes chers amis, je vous demande pardon, mais comme tous mes éminents collègues, je suis capable d'être président et de recevoir un salaire plus confortable pour un travail plus compatible avec mes capacités. Je souhaiterais qu'on en tienne compte, qu'on me paye un salaire plus élevé pour compenser ce travail désagréable et pénible, voire me permettre de travailler moins d'heures pour épargner mes forces vitales jusqu'à ma retraite ! »

Tereza



Blankvinaj keksoj

Klasikega recepto de mia patro, ĉiam sukcesa ! Tre taŭgas kun tizano.

Ingrediencoj :

- 200 ml da blanka vino ;
- 200 g da sukero ;
- 150 ml da oleo (sunflora aŭ alia) ;
- 1 000 g da faruno tritika.

Ĉion miksi, buligi kaj

platigi al kelkcentimetra (1-2) tavolo kaj eltanĉi disketojn (per mallarĝa glaso).

Kuiri je 250 °C dum 10-15 minutoj returnante ilin kiam ekkoloriĝas kaj tiam malaltigante al 200 °C.

Tre oportunaj por kunpreni okaze de vojaĝo.

PaVito

Deklaracio de la 91a SAT-kongreso

Déclaration du 91^e congrès de SAT

La 91a SAT-kongreso okazinta en Kragujevac (Serbio) de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto 2018 :

- atentigas pri danĝero de tutmonde kreskanta naciismo, foje eĉ faŝismo, kaj memorigas ke SAT-anoj daŭre kontraŭbatalas ĝin per praktika uzo de Esperanto en laborista medio, kaj flegado de eksternacia sent-, pens- kaj agad-kapablo ;
- favore notas la interparolojn de norda Koreio kaj suda Koreio ;
- kondamnas la novan malvarman militon inter Usono kaj multaj aliaj NATO-landoj unuflanke kaj Rusia Federacio aliflanke ;
- alvokas ĉiujn partopreni en porpacaj movadoj ;
- pledas ke financa profito ne regu sociajn rajtojn ;
- konstatas, ke la situacio rilate rifuĝintojn kaj ekonomiajn migrantojn fariĝas pli kaj pli neeltenebla, kaj petas ke la alcelataj landoj agu por ĉesigi la militojn, por plibonigi la vivkondiĉojn en la landoj de la rifuĝintoj aŭ engaĝi rilate rifuĝintojn kreante strukturojn por ilin akcepti ;
- kuraĝigas ĉiajn unuopajn kaj kolektivajn klopodojn kaj iniciatojn cele al ĉesigo de l' planeda detruado kiel ekzemple : politika aktivado sociala kaj ekologiisma, sen envolviĝo de entreprenoj kiuj profitas la okazon por ekspluati siajn laboristojn, vegetajigo de la ĝenerala nutromaniero, loka kaj ekologia konsumado, malkreskismo produktada kaj demografia, « ĝoja sobereco » sen rezignemo ;

- salutas la sukcesan batalemon de la laboristoj en la aŭtomobila fabriko FIAT de Kragujevac – kiuj sukcese atingis salajropialtigojn per strikado – kaj atentigas ilin pri la potencialo de Esperanto, apud aliaj lingvoj, por plifortigo de mondskalaj kontaktoj kun alilandaj laboristoj en la aŭtomobila sektoro ;
- subtenas ĉiujn klopodojn ebligi decajn vivkondiĉojn al homoj ĉie en la mondo, ne nur en metro-

Le 91^e congrès de SAT, qui a eu lieu à Kragujevac (Serbie) du 5 au 12 août 2018 :

- met en garde sur le danger de la montée du nationalisme, parfois même du fascisme, partout dans le monde, et rappelle que les membres de SAT se battent continuellement contre ceux-ci par l'utilisation pratique de l'espéranto dans le milieu ouvrier, et en cultivant une capacité à sentir, penser et agir extra-nationale ;*



RR (DR)

Kio estas SAT ?

Sennacieca Asocio Tutmonda : naskiĝis en 1921, estas asocio tutmonda de laboristoj, kaj pli ĝenerale de progresemluloj, kies agado centriĝas sur kulturo kaj popola edukado. Ĝi utiligas Esperanton kiel laborlingvon. www.satesperanto.org

Aliĝo kun abono al « Sennaciulo » 52 € (Nura abono : 57 €)

• En Francio : Barthélémy Maurau ; 3, allée Nathalie-Sarraute, 27000 Evreux p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070; BIC_ : PSSTFRPPPAR

• En Belgio : Claude Glady ; Rue du Colot, 1 ; B-5630 Cerfontaine ; Bankkonto N° 750-6373051-18

- note avec satisfaction le dialogue instauré entre la Corée du Nord et la Corée du Sud ;*

- condamne la nouvelle guerre froide entre les États-Unis et beaucoup d'autres pays de l'OTAN d'un côté et la Fédération de Russie de l'autre côté ;*

- appelle à tous à participer aux mouvements œuvrant pour la paix ;*

- plaide pour que le profit financier ne régie pas les droits sociaux ;*

- constate que la situation relative aux réfugiés et migrants économiques devient de plus en plus insupportable et demande que les pays cibles agissent pour faire cesser les guerres, améliorer les conditions de vie dans les pays d'origine ou s'engagent pour les réfugiés en créant des structures pour les accueillir ;*

- encourage tous les efforts et initiatives, individuels ou collectifs, visant l'arrêt de la destruction de la planète comme par exemple : l'action politique sociale et écologique sans l'entremise d'entreprises qui profitent de l'occasion pour exploiter leurs travailleurs, la végétalisation de l'alimentation en général, une consommation locale et écologique, la décroissance dans la production et la démographie, la sobriété heureuse sans résignation ;*

- salue la lutte victorieuse des ouvriers de l'usine automobile FIAT de Kragujevac – qui ont réussi à obtenir des hausses de salaire par la grève – et attire leur attention sur le potentiel de l'espéranto, à côté des autres langues, pour renforcer les contacts à l'échelle mondiale avec les travailleurs d'autres pays dans le secteur automobile ;*

- soutient toutes les démarches pour permettre aux hommes de vivre dignement partout dans le monde, non seulement dans les mé-*

poloj, kiuj celas koncentrigon de ekonomia kaj politika potencoj, sed ankaŭ en la kamparo kaj en mezgrandaj urboj kiel Kragujevac.

tropoles qui cherchent à concentrer les pouvoirs économique et politique, mais aussi dans les campagnes et les villes de taille moyenne comme Kragujevac.

Gvidrezolucio de la 91a kongreso

Résolution d'orientation du 91^e congrès

La 91a SAT-kongreso okazinta en Kragujevac (Serbio) de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto 2018 :

- spronas al solvado de lastaj praktikaj detaloj por aperigo de ĝisdata papera adresaro plej malfrue en la komenco de 2019 ;
- subtenas la klopodojn de membroj serĉi rimedojn por emancipiĝi el maletikaj diskutlistoj kaj sociaj retoj ankoraŭ uzataj en SAT ;
- instigas la membrojn al limigo de insultaj interŝanĝoj en la SAT-diskutlisto por ne fuĝigi la partoprenantajn SAT-anojn kaj permesi pli da fruktodonaj debatoj por plievoluigi la SAT-movadon ;
- deziras, ke SAT-diskuto pliboniĝu per partopreno de pli da kamaradoj kaj per kreado de malpli babileca kaj pli serioza debata etoso en ĝi ;
- invitas la Poresperantan Fakon funkciigi vikipedian grupon kiu nutrus kaj ĝisdatigus la SAT-rilatajn artikolojn de Vikipedio en Esperanto kaj aliaj lingvoj ;
- instigas SAT-anojn ampleksigi la ekzistantajn nacilingvajn artikolojn en Vikipedio pri SAT kaj SAT-rilataj temoj kaj krei artikolojn pri ili en lingvoj en kiuj artikoloj ankoraŭ ne ekzistas ;
- varme alvokas al frua aliĝado al 92a SAT-kongreso en Barcelono okazonta de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 2019 ;
- atentigas ke kongresa programo nepre aperu frue, eĉ en provizora formo, por ebligi al SAT-anoj kaj gastoj aliĝi instige de enhavoriĉa programo ;
- petas, ke la venontaj OKK-oj evitu samtempecon de laborkunsidoj kun kernaj aranĝoj ;
- memorigas, ke dum SAT-kongresoj okazu laŭeble kontakto kun lokaj sindikataj kaj ĝenerale laboristaj organizoj ;
- bonvenigas la okazigon de praktikaj laborgrupoj pri redaktado de Sennaciulo kaj de SAT-retejo, kaj esprimas deziron pri okazigo de pliaj trejno-sesioj dum venontaj kongresoj ;
- bonvenigas la okazigon de la venontjara ILEI-kongreso en Čačak (13a-20a julio 2019) kaj kuraĝigas SAT-anojn ĝin partopreni, cele al refortigo de Esperanto-movado en Balkanio ;
- konstatas, ke kunlaboro kun ILEI povas esprimiĝi per eldonado de pedagogiaj lerniloj taŭgaj por laboristoj kaj rifuĝintoj, kiuj devis frue forlasi la klasikan eduk-sistemon ;
- gratulas pri la laboro farata de Eldona Fako Kooperativa kaj kuraĝigas al aperigo de novaj eldonaĵoj retaj kaj paperaj ;
- alvokas la SAT-anaron identigi laborkampojn, en kiuj ĝi kaj la esperantlingvanoj ĝenerale povas utile kontribui al la forpuŝo de naciismaj tendencoj ;
- subtenas la proponon, ke la PK okazigu regulajn perretajn opinisondojn inter la membroj pri SAT-specifaj kaj ĝeneralaj politikaj kaj sociaj temoj ;
- kuraĝigas SAT-anojn proponi esperantajn klerigo-tagojn al sindikatistoj precipe kiam haveblas subvencioj ĉu monaj ĉu per dispono de pagitaj labortagoj ;
- vokas membrojn laŭeble helpi en la vivo aŭ revivigo de LEA-oj.

Le 91^e congrès de SAT, qui s'est tenu à Kragujevac (Serbie) du 8 au 12 août 2018,

- *encourage à régler les derniers détails pratiques pour la publication d'un annuaire mis à jour au plus tard au début de 2019 ;*
- *soutient les démarches effectuées par des membres pour chercher à s'émanciper de listes de discussion et de réseaux sociaux qui, quoique contraires à l'éthique, sont encore utilisés à SAT ;*
- *souhaite que le site de SAT-Diskuto soit amélioré par la participation de plus de camarades et par la création d'une ambiance moins bavarde et d'un débat plus sérieux en son sein ;*
- *invite le Poresperanta Fako (la section pour la diffusion de l'Espéranto) à faire fonctionner un groupe de Wikipédia qui nourrisse et mette à jour les articles relatifs à SAT de Wikipédia en Espéranto et en d'autres langues ;*
- *incite les membres de SAT à amplifier les articles en langues nationales qui existent dans Wikipédia au sujet de SAT et de sujets relatifs à SAT, et de créer des articles à ces sujets dans des langues où il n'en existe pas encore ;*
- *appelle chaudement à une adhésion précoce au 92^e congrès de SAT, qui se tiendra à Barcelone du 4 au 12 août 2019 ;*
- *appelle l'attention sur le fait qu'il faut impérativement que le programme du congrès soit publié tôt, même si c'est sous forme provisoire, pour permettre aux membres de SAT et aux hôtes d'adhérer, attirés par un programme de riche contenu ;*
- *demande que les OKK (comités d'organisation de congrès) futurs évitent la coïncidence de séances de travail avec d'autres dispositions importantes ;*
- *rappelle que pendant les congrès doivent avoir lieu autant que possible des contacts avec les syndicats et autres organisations de travailleurs locaux ;*
- *souhaite la bienvenue à la création de groupes de travail pratiques au sujet de la rédaction de Sennaciulo et du site Web de SAT et exprime le vœu qu'aient lieu davantage de sessions d'entraînement lors de congrès futurs ;*
- *souhaite la bienvenue à l'organisation l'an prochain du congrès D'ILEI à Čačak (Serbie, du 13 au 20 juillet 2019) et encourage les membres de SAT à y participer afin de renforcer le mouvement espérantiste dans les Balkans ;*
- *constate que la collaboration avec ILEI peut s'exprimer par l'édition de moyens pédagogiques adaptés à des travailleurs et des réfugiés qui ont dû quitter tôt le système d'éducation classique ;*
- *exprime ses félicitations pour le travail effectué par l'Eldona Fako Kooperativa (la section coopérative d'édition) et encourage la publication de nouvelles éditions sur Internet et sur papier ;*
- *appelle les membres de SAT à identifier des champs d'action dans lesquels SAT et les espérantophones généralement peuvent contribuer utilement à repousser les tendances nationalistes ;*
- *soutient la proposition que le PK (comité exécutif) organise des sondages d'opinion réguliers par Internet entre les membres sur des sujets politiques et sociaux spécifiques à SAT ou généraux ;*
- *encourage les membres de SAT à proposer des journées éducatives espérantistes à des syndiqués, principalement quand des subventions peuvent être obtenues sous forme directe ou sous forme de journées de travail payées ;*
- *appelle les membres à aider des LEA autant que possible à vivre ou à renaître.*

Tra la fenestro - Par la fenêtra

Saluton al ĉiuj,

Lastan fojon (n° 121) mi « postskribis » ke, eble, mi parolos pri la pariza kongreso, ĉu ne ?

Do, hodiaŭ, ĉu mi havas ion por aldoni al la detala protokolo kiun vi povis legi en nia lasta numero (n° 121) ?

Eblas... eblas paroli pri detalo, iu eĉ povus diri, pri bagatelo. Tamen mi devas tie konfesi, pri bagatelo kiun mi konsideras grava.

Dum tiu lasta kongreso, ĉu vi aŭdis ion pri iu kies propronomo estas Alexandre ? Mi dubas... Tamen oni parolis pri li en la kongreso de Sankta-Sebastiano-ĉe-Luaro. Tiu nesatamikarana, ekskontista, ĵusa emerito proponis helpi nian asocion pri la kontoj (ĉar, tiuepoke, nia antaŭa kasisto deziris rezigni tiun fakon kaj neniu el la asocio volontule proponiĝis).

Pro diversaj kialoj, probable ĉar, finfine, iu el nia asocio proponiĝis por iĝi kasistino, oni komprenigis al Alexandre ke nia asocio ne plu bezonas lin, ĉefe ĉar li ne parolas Esperanton (sed eble ankoraŭ ne !).

Ĉu ciferoj ne similas en Esperanto kaj en la franca ? Ĉu iu el ni provis per konvinko varbi tiun raciemon al Esperanto ? Ĉu nia asocio montris la mensan malfermon, kiun oni povas esperi ene de esperanta asocio ?

Ĉu vi aŭdis la plej etan vorteton por adiaŭi kaj danki lin ? Mi, ne.

Mi ne kredas ke, iun tagon, li iĝos esperantisto.

Mi estas elrevigita... Nu, morgaŭ, ĉio pli bone glatos, ĉu ne ?

Ĝis, **Dzeka**



Bonjour à tous,

La dernière fois (n° 121), je vous ai écrit en post-scriptum que, peut-être, je vous parlerais du congrès de Paris, n'est-ce pas ?

Bon, ai-je aujourd'hui quelque chose à ajouter au compte-rendu détaillé que vous avez pu lire dans notre dernier numéro (n° 121) ?

Peut-être... peut-être puis-je parler d'un détail, certains pourraient même dire une bagatelle. Cependant, je dois le confesser ici, une bagatelle qui me tient à cœur.

Pendant ce dernier congrès avez-vous entendu quelque chose concernant un certain Alexandre ? J'en doute... Pourtant on avait parlé de lui au congrès de Saint-Sébastien-sur-Loire. Cet ancien comptable, tout juste retraité, non membre de SAT-Amikaro, a proposé d'aider notre association pour la comptabilité (car, à cette époque, notre ancien comptable désirait renoncer à cette activité et personne de notre association ne s'était porté volontaire).

Pour diverses raisons, probablement parce que, finalement, quelqu'un de l'association s'est proposé comme comptable, on a fait comprendre à Alexandre que notre association n'avait plus besoin de lui, surtout parce qu'il ne parlait pas espéranto (mais, peut-être, pas encore !).

Les chiffres sont-ils différents en espéranto et en français ? Est-ce que l'un d'entre nous a tenté de convaincre et de gagner à l'espéranto ce rationaliste ? Notre association a-t-elle montré l'ouverture d'esprit que l'on peut espérer de la part d'une association espérantiste ?

Avez-vous entendu le moindre petit mot d'au revoir ou de remerciement pour lui ? Moi, non.

Je ne crois pas qu'il se mette un jour à l'espéranto.

Je suis déçue... Allez, tout ira mieux demain, non ?

À plus, **Dzeka**

SAT-Amikaro

132/134, boulevard Vincent-Auriol,
75013 Paris

Tel. : 09 53 50 99 58. Fax :
09 58 50 99 58.

sekretario@sat-amikaro.org

Retejo

www.sat-amikaro.org

• Sideja deĵorhoraro. Permanence
au siège
(kontroli antaŭe telefone) (vérifier
avant par téléphone)

Lundi 17:30 - 19:00

Mardi 14:00 - 18:00

Mercredi 13:00 - 18:00

Jeudi 15:00 - 18:00

Vendredi 9:30 - 16:30 ; 18:30 - 19:30

Samedi 11:00 - 18:00 dont de 15:00
à 18:00 initiation possible pour déb
utant y compris en juillet

• Cours oraux au siège - pour débutants :

Les lundis 17:30 avec Georges
Meilhac

**Retrouvez toute la liste des
cours d'espéranto sur le site de
SAT-Amikaro.** (cherchez la rubrique
« Cours d'espéranto » :

[http://esperanto-
sat.info/rubrique97.html](http://esperanto-sat.info/rubrique97.html))

Cette rubrique tente de référencer
un maximum de cours d'espéranto se
déroulant en francophonie. Pour
toute mise à jour ou cours manquant,
nous contacter.

Conseils d'apprentissage : contac-
tez SAT-Amikaro libroservo.

**Paiements et renseignements
sur SAT-Amikaro**

• **Belgio Belgique** Claude Gladly :
Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine;
Reto : cglady@arcadis.be

Tel : 071/64 49 16 (en Belgio).

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC :
AXABBE22

• **Svisio Suisse** Mireille Grosjean :
Grand-Rue 9, CP 9, CH-2416 Les
Brenets.

Poŝta konto n° 23-14908-9.

• **Aliaj landoj Autres pays** Pagoj
paiements poŝta sendo sidejen
envoi postal au siège.

reto : kasisto@sat-amikaro.org

Tel : 0033 (0) 953 927 737

Fakso : 0033 (0) 222 441 319

• **Pago per ĝiro virement :**

SAT-Amikaro.

LBP (CCP) : 37 852 90 L 033

IBAN, FR32 2004 1010 1237 8529



0L03 314; BIC : PSST FRPPSCE

(indikante al kio kaj al kiu rilatas
la pago en indiquant l'objet et le
bénéficiaire du paiement)

Pseudo page pour faciliter les manipulations

**Bien sûr, rien ne paraîtra au-delà de la page 16,
mais avec le logiciel de mise en page Scribus, il
est souvent utile d'ajouter des pages pour avoir un
endroit où déposer les éléments que l'on manipule.
C'est de la cuisine technique, ne vous en inquiétez
pas. :-)**

Voici un retour
forcé.



- 1 - 12,300
- 2 - 16,215
- 3 - 20,131
- 4 - 24,046
- 5 - 27,961
- 6 - 31,877
- 7 - 35,792
- 8 - 39,707
- 9 - 43,623
- 10 - 47,538
- 11 - 51,453
- 12 - 55,369
- 13 - 59,284
- 14 - 63,199
- 15 - 67,115
- 16 - 71,030
- 17 - 74,946
- 18 - 78,861
- 19 - 82,776
- 20 - 86,692
- 21 - 90,607
- 22 - 94,522
- 23 - 98,438
- 24 - 102,353
- 25 - 106,268
- 26 - 110,184
- 27 - 114,099
- 28 - 118,014
- 29 - 121,930
- 30 - 125,845
- 31 - 129,760
- 32 - 133,676
- 33 - 137,591
- 34 - 141,506
- 35 - 145,422
- 36 - 149,337
- 37 - 153,252
- 38 - 157,168
- 39 - 161,083
- 40 - 164,998
- 41 - 168,914
- 42 - 172,829
- 43 - 176,744
- 44 - 180,660
- 45 - 184,575
- 46 - 188,490
- 47 - 192,406
- 48 - 196,321
- 49 - 200,237
- 50 - 204,152
- 51 - 208,067
- 52 - 211,983
- 53 - 215,898
- 54 - 219,813
- 55 - 223,729
- 56 - 227,644
- 57 - 231,559
- 58 - 235,475
- 59 - 239,390
- 60 - 243,305
- 61 - 247,221
- 62 - 251,136
- 63 - 255,051
- 64 - 258,967
- 65 - 262,882
- 66 - 266,797
- 67 - 270,713
- 68 - 274,628
- 69 - 278,543
- 70 - 282,459